

## & Rimvanto:

< Rekante 21 el 37 batoj por strofo, entute 185 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Mikaelo Bronŝtein (2014). Baladigis Martin Strid (2015) per sama melodio kiel por &Konfeso kaj simila rekantaĵo.>

### (# Melodio:

<:37> (

/dodo dore doTi LaSo; dodo dore mimi mimi; mifa soso somi milre; dore doTi LaLa LaSo;

(#Rekantaĵe: do mire do dodo Ti La; LaTi dodo dore mimi; mifa somi mire do; do mire do dodo Ti La a)

)×5 )+

### (&Strofoj:

'1 Jen rimanto kun rimvanto ; fajfe flaras freŝan temon. ; Jen rimato en rimvato ; enŝovatas en poemon.

(×:; **Zorgojn mi foje forgesas ; Mia mis' neniam ĉesas ; per poemo palpas mi ; Tamen mi same necesas.**)

'2 Sed rimvato mole mola ; la rimaton senpezigas. ; La rimanto senkonsola ; la rimvanton ŝnure ligas, .....

'3 morne faras firman nodon, ; ŝirmas pezan kor-kurtenon; por en ĉiun epizodon ; malebligi la rimvenon, .....

'4 por pezigu la liniojn ; gruzo de la grav' senrima,; por eviti l' opiniojn ; pri verŝad' facilanima. ....

'5 Kaj mergiĝas en trankvilo ; en argilon de l' ripozo ; sen kompreno, ke l' facile ; ne malbonas eĉ por prozo. ....)